



Universala Esperanto-Asocio

Esperanto kaj la estonteca plurlingvismo

Diskuto kun Umberto Eco

Esperanto-dokumentoj priskribas la laboron, organizon, kulturon kaj historion de la Esperanto-movado. Ili aperas unuavice en Esperanto kaj en la angla kaj franca lingvoj; laŭ la ebloj aperos similaj serioj ankaŭ en aliaj lingvoj. La enhavo de la diversaj serioj ne estas identa. Ĉi tiu serio anstataŭas tiujn dokumentojn antaŭe eldonitajn de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), kiuj pritraktis la Esperanto-movadon.

Reprodukto, ekstrakto aŭ traduko estas permesita, kondiĉe ke la fonto estu indikita.

La dokumentoj estas aboneblaj ĉe la landaj kotizperantoj de UEA aŭ rekte ĉe la eldonejo: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Abono validas ne por difinita periodo sed por fiksita nombro de dokumentoj. La abonprezo de 46 guldenoj ampleksas 10 dokumentojn en unu serio (Esperanta, franca aŭ angla).

La prezo de unuopa dokumento estas 4,80 guldenoj. Ekde tri ekzempleroj de sama dokumento unu ekzemplero kostas 3,20 guldenojn. Por grandaj kvantoj oni povas peti de UEA oferton pri aparte favora prezo. Al la prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 5 guldenoj) kaj por klientoj en la Eŭropa Unio 6% por la enlanda imposto.

Redaktoro: Thomas Bormann

ESPERANTO KAJ LA ESTONTECA PLURLINGVISMO

**Diskuto de Umberto Eco kun István Ertl kaj François Lo Jacomo,
la 20-an de januaro 1993, en Parizo**

Konata de vasta publiko, interalie pro sia romano La Nomo de la rozo (1980), kaj de la sciencistaro pro gravaj semiotikaj verkoj, Umberto Eco postenis, dum la universitata jaro 1992-93, en Eŭropa Katedro de “Collège de France” (plej prestiĝa instruejo en Francio), kun prelegserio pri “la serĉado pri perfekta lingvo tra la historio de la eŭropa kulturo” (la rezultinta verko, aperinta en la itala kun la titolo La Ricerca della lingua perfetta, publikiĝis ankaŭ en la germana, la hispana, la franca,¹ kaj aperos angle kaj hungare).

Pro tiu temo, li nepre aludis la demandon pri Esperanto, kaj multaj esperantistoj interesiĝis pri lia vidpunkto. La 20-an de januaro 1993, li konsentis jenan longan diskuton kun István Ertl, redaktoro de la revuo de UEA Esperanto, kaj François Lo Jacomo, Pariza lingvisto, membro de la Akademio de Esperanto; multajn temojn ni preparolis koncerne la internacian komunikadon, ne limigante nin al Esperanto mem: ekzemple ni unue pritraktis la tradukadon, kiu paradokse ŝajnas necesa kondiĉo por ekzisto de universala “ne perfekta” lingvo.

Eco: Mi diru, ke unuafoje en la historio oni pritraktas laŭ rigora maniero la problemon de tradukado, kiu estis, ĝis nun, filozofia sed nebula demando. Nur nun ekaperas, ekzemple, la problemo de font-orientita kaj cel-orientita traduko,² tre gravaj nocioj . . .

Kaj – tion mi pliprecizigos dum mia morgaŭa lekcio – mi opinias, ke por vi la problemo de tradukado estas fundamenta. Ĉar Esperanto povas ekzisti nur se oni agnoskas la principon, ke ja eblas traduki: jen precize mia aktuala temo. Se ekzistus perfekta lingvo, ĝi estus la parametro por ĉia ebla traduko. Sed pro la fakto, ke ne ekzistas parametra lingvo, eblas traduki al Esperanto aŭ el Esperanto al aliaj lingvoj nur se eblas traduki de iu ajn lingvo al iu ajn lingvo. Estas ja paradokso, ĉar la principo mem de tradukado devus malpliigi la rolon de Esperanto: se eblas traduki inter la diversaj lingvoj, ne necesas interlingvo. Tamen interlingvo povas ekzisti nur se ja eblas traduki, mi diru ne nur inter la franca kaj la itala, sed inter la hopia kaj la japana; alikaze, ĉio ĉi disfalas.

Estas do tiu ĉi fantomo de tradukado, kiu unuavide devus malaperi pro interlingvo, sed kiu male konsistigas la principon mem, laŭ kiu povas ekzisti kaj vivi interlingvoj. Tre interesa problemo, ĝis nun ne solvita.

Lo Jacomo: *Iu ekstudis, ĉu esperantistoj ĝenerale scipovas pli da fremdaj lingvoj, krom Esperanto, ol aliaj homoj. Mi ne scias, ĉu liaj rezultoj estas signifaj, sed estas ja demando.*

Mi intuicie opinias, ke esperantistoj estas ĝenerale pli plurlingvaj, kaj pli sentemaj pri aliaj lingvoj kaj pri tradukproblemoj. Mi celas, ke en diskuto kun esperantistoj tradukproblemoj ŝajnas pli konataj ol en diskuto kun aliaj homoj . . .

Eco: Principe ili ja devus esti plurlingvaj, pro la principo, ke iu ajn lerninta duan lingvon estas pli malfermita al lernado de tria. Tion mi spertis pro miaj filoj mem, denaske dulingvaj ĉar mia edzino estas germana. Kiam ili envenas novan landon, ili tre facile eklernas trian lingvon, eĉ se poste ili forgesos ĝin, sed estas mensa preteco je la multeco de lingvoj.

LA GEPATRA LINGVO

Ertl: *Ĉu temas ja pri mensa preteco, aŭ pri propedeŭtika rolo de la du jam lernitaj lingvoj?*

Eco: Jen ekzemplo. Iam amiko diris al mi: “Ha! estas danĝere eduki siajn filojn dulingve. Ĉar natura emo identigi nomojn kun nomitaĵoj kreas en dulingva infano distranĉiĝon de la personeco”.

Mi do deziris eksperimenti tion. Iun matenon, mi demandis al mia filo:

“Kio estas tio?”

– **Burro** [butero, itallingve].

– Sed ĉu ne estas ankaŭ **Butter** [butero, germanlingve]?

– Jes ja, li respondis, estas ankaŭ **Butter**”.

Mi disduigis ĝin kaj diris:

“Kiu el la du estas **burro** kaj kiu estas **Butter**?”

– Ambaŭ same estas **burro** kaj **Butter**”.

El tio mi konkludis:

“Fakte ne, ne estas dividiĝo de la realo”.

Sekve, denaska scio, ke tiuj ĉi aĵoj povas havi du nomojn, mense pretigas al la ebleco, ke ili povas havi trian nomon.

Ertl: *François Lo Jacomo kaj mi ĵus diskutis pri alia ekzemplo . . . Iu Taeschner, kies gefiloj same estas itallingvaj kaj germanlingvaj, verkis libron titolitan: La suno estas ina. Ĉar liaj gefiloj metis la problemon, ĉu la suno, germanlingve **die Sonne**, estas knabineto aŭ knabeto.³ Tion ili demandis al sia patrino, tuj kiam ili konsciiĝis pri la diferenco inter la du lingvoj.*

Eco: Fakte, sed pri dulingvismo oni nun tre malmulton scias . . . Lingvisto diris, ke nur la lingvistoj edz(in)iĝintaj kun alilingvan(in)o kapablas studi tion, alikaze mankas la propra sperto pri ĉiutage observata infano. Sed ĝis antaŭ nelonge troviĝis tre malmulte da tiaj geedzoj, kaj inter ili ne ĉiuj interesiĝis pri dulingveco. Li konkludis, ke estas ja manko, kaj ke la manko de studoj ŝuldiĝas precize al tio.

Ĉar nun la dulingvaj paroj iĝas, se ne normo, tamen io tre normala en la eŭropa socio, eble ni havos pli bonajn studojn pri dulingveco.

Ertl: *Oni ekplanas eksperimenton en la universitato La Sapienza en Romo, pri dudeko da patrinoj, nun gravedaj, kiuj naskos dulingvajn infanojn (Esperanto kun alia lingvo). Fakte, oni nun serĉas tiajn patrinojn . . .*⁴

Eco: Alia sperto mia estis jena: ne ekzistas laŭ mi absoluta dulingveco. Jes ja, estas famaj verkistoj, kiel Beckett,⁵ kapablaj verki en ambaŭ lingvoj, tamen tio estas escepto, ne normo. Kaj malĝusta estas la mito pri la patrino lingvo. Ne kun la lingvo de sia patrino identiĝas infanoj, sed kun tiu de la pordisto, nome: la surstrata lingvo.

Miaj filoj, en Italio, lernis de sia patrino la germanan, tamen ilia lingvo, kiam ili parolas inter si, estas la itala. En Milano – ĉar troviĝas tie du germanaj lernejoj, tre bonaj, el kiuj unu situas precize apud nia hejmo – ili vizitis germanan lernejon, kies lernantoj plejparte naskiĝis en Germanio sed parolis inter si, en la lernejo, la italan. Alidire, la venkanta lingvo estas la surstrata lingvo. Tio estas problemo por vi, evidente, ĉar ĉia Esperanta dulingveco, pro la fakto ke surstrate oni parolas lokan lingvon, metos vian lingvon en suban pozicion.

Mi ne scias, ĉu temas pri absoluta regulo, sed estas mia impresio: ĉiam estas pli forta lingvo, la ĉirkaŭa lingvo. Kompreneble, se la infano estas enŝlosita en sia domo, kie li parolas unu lokan lingvon, ne rajtante eliri surstraten, eble la alia lingvo estos pli forta. Tamen mi opinias, ke ĝenerale tio ne okazas.

Lo Jacomo: *Jen precize . . . mi opinias, ke lingvo respondas al bezono je komunikado: iu individuo povas havi diversajn bezonojn je komunikado, kelkajn kun kiuj li sentas sin pli komforta, aliajn kun kiuj li sentas sin malpli komforta. Estas lingvaj rifuzoj ne pro lingvistikaj kialoj, sed pro simpla rifuzo de iu komunika situacio.*

Mi diru, ke iu, por kiu la surstrata etoso ŝajnas hejma, emas aŭtomate alpreni la surstratan lingvon; se li spertas, ekzemple, konfliktojn kun siaj gepatroj, li emas rifuzi la gepatran lingvon . . . Temas ja pri konataj situacioj.

Mi donu ekzemplon: filino de amikino, en Zagrebo, ĵus komencis lernejon. Antaŭ ol viziti la lernejon, ŝi uzis kvazaŭ egale Esperanton kaj la kroatan, sed

de kiam ŝi ekhavis amikinojn, nepre necesis, ke tiu ĉi Esperanto estu akceptita de ŝiaj amikinoj; estus ja katastrofo se la amikinoj rifuzus tiun ĉi lingvon.

*Mi opinias, ke krom la pure lingvistika flanko, ekzistas afekcia⁶ flanko de lingvo. Kaj tiuflanke Esperanto estas por mi io malsama ol aliaj lingvoj. La aliaj lingvoj estas lingvoj de grupoj: oni lernas ilin por eniĝi tiujn grupojn; dum Esperanto estas iasence lingvo de certaj **individuoj** tra la mondo: Esperanton oni lernas por eliri el grupo en kiu oni estas nature mergita. Tiuj, kiuj sentas sin komforte en la koncerna grupo emas mense rifuzi Esperanton, dum tiuj, kiuj sentas sin malkomforte eble provas malmergiĝi dank' al Esperanto.*

Eco: Ne, tio rilatas al la fakto, ke la granda esperantista grupo povas fariĝi, por kelkaj personoj, grupo al kiu oni afekcie ligiĝas.

Kaj mi mencias du strangajn fenomenojn: mi konstatas, ke dum la dudek lastaj jaroj ĉiujn semiotikajn verkojn miajn mi verkis unue anglalingve, pro praktikaj kialoj. Pro tio, ofte okazas, kiam mi pripensas teorian problemon, ke mi pensas pri ĝi anglalingve, precipe se ĝi rilatas al unu el tiuj verkoj. Aliflanke, en Usono mi konatiĝis kun homoj, kun kiuj mi parolis francalingve okaze de nia unua renkontiĝo: antaŭ kelkaj tagoj, mi renkontis ĉi tie unu el tiuj usonaj amikoj, kaj ni tuj parolis france. Do kreiĝas specialaj afekciaj situacioj.

Iam mi diris dum lekcio: “Interlingvo ĉiam estos nur por publikaj rilatoj, neniam estos gepatra lingvo”, mi eĉ aldonis ŝerce: “Neniam oni amoros per interlingvo”. Kaj mi ricevis letereton, iom embarasan, de studentino diranta: “Sinjoro, vi malpravas. Tre bone eblas amori en la lingvo Esperanto”. Mi ne sciis, ĉu temas pri propono, ĉar ŝi aldonis: “. . . mi faras tion”. Post ioma tempo ŝi demandis min, kion mi respondas al ŝia letereto. Mi diris: “Ja evidentas, ke se du geinstruistoj pri la helena lingvo enamiĝas, eble ili amoros en la helena, ĉar estos ilia maniero krei sian sekretecon”.

Ne eblas do ekskludi la eblon, ke kun iu persono mi amoru nur pollingve, pro, mi diru, afekciaj kialoj, se konvenas tia esprimo. Kaj se veras, ke ekzistas afekcia ligo kun la esperantista komunumo, eblas kompreni, ke esperantistoj amoras Esperante. Sed refoje temas pri afekcia specialaĝo.

LA ŜANCOJ DE ESPERANTO

Mi nun faros deklaron, kiu klarigos mian sintenon pri Esperanto. Ĝis antaŭ ses monatoj – kvankam de tri aŭ kvar jaroj mi laboris pri tiu afero koncerne perfektan lingvon, sciante ke ĉe la fino mi atingos la internaciajn lingvojn, kelkaj libroj atendis sur mia breto . . . – mia opinio, dum mi nenion

sciis pri ĉio ĉi, estis, ke ne eblas akceptigi artefaritan lingvon, ĉar la historio demonstris, ke tio ĉi neniam estis ebla, ke temas do pri utopio. Sed mi krome havis alian ideon: iom akceptante la koncepton de Whorf, mi opinias, ke ĉiu lingvo konsistigas vidmanieron al la mondo, kaj do ke lingvo ne povas esti neŭtrala, ĝi ĉiam estos vidmaniero al la mondo kolizianta kun aliaj vidmanieroj.

Poste, pro scienca zorgo, mi ekokupiĝis pri la demando, provis lerni la gramatikon de Esperanto kaj legi ion; kaj mi diru, ke ŝanĝiĝis mia sinteno.

Ke historie neniam eblis akceptigi artefaritan lingvon estas ja tre forta argumento, tamen ne decida, ĉar en la historio oni ankaŭ demonstris, ke ne eblas iri sur la Lunon, kvankam per difinita teknologio tio fariĝis ebla. Tiel ke en mondo, kie senintence Italio instruis la italan lingvon al albanoj per nur ĉiuvespera televida elsendado . . .

Ertl: *Pro kio, cetere, albanaj esperantistoj parolas miksitan dialekton Esperantitalan . . .*

Eco: . . . la fakto, ke eblis, dum kelkaj jardekoj, ne devigi sed instigi tutan landon al lernado de lingvo nur pro potenco de amaskomunikiloj, aŭ ke hodiaŭaj junuloj parolas iel la anglan pro rokmuziko kaj kelkaj filmoj . . . sugestas, ke eble ni troviĝas en historia momento, kiam estas pli facile enkonduki eĉ lingvon artefaritan. Pro tio mi komencas vidi la aferon kun malpli strikta sinteno.

Tiel ke, el la tri ĉefaj kontraŭaj argumentoj – historia neebleco, mondo kaj lingvoj malakceptemaj, lingva ŝanĝiĝo – la sola, kiun mi daŭre konsideras valida (mi legis aludon al ĝi en la intervjuo de Martinet)⁷ estas, ke se lingvo estas parolata, ĝi nepre ŝanĝiĝas, kaj se temas pri internacia lingvo disvastiĝanta, ankaŭ ĝi riskas ŝanĝiĝi. Se estas Centro kontrolanta ĝian evoluon, ne plu temas pri natura lingvo, tio iĝas tro direktata afero kiel la klasika franca lingvo regata de sia Akademio.

Tie situas, laŭ mi, la fundamenta kontraŭdiro, sed pri kio eblas nenion diri, ĉar ne ekzistas historia sperto. Nur kiam dek milionoj da japanoj ekparolos Esperanton, eblos konstati, ĉu la japana Esperanto jes aŭ ne dialektiĝas, kaj kiamaniere eblas el Ĝenevo, ekzemple, direkti la evoluon de Esperanto uzata de japanoj. Mi opinias, ke ĉi-rilate vi mem havas hipotezojn, dezirojn, ideojn, sed ne respondojn.

Ertl: *Precize, la disertacio de François Lo Jacomo titoliĝas Libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto, kaj li konstatas ĉi-rilate la ekziston de du polusoj, eĉ se temas pri Esperanto . . .*

Eco: Pri teoriaj polusoj mi ja scias, sed draste ŝanĝiĝas la problemoj, kiam de unu miliono vi atingas miliardon. Via espero, ke el kvar miliardoj da personoj tra la mondo, du miliardoj parolos . . .

Ertl: ... *se tion ni esperas* ...

Eco: ... parolos Esperanton, samtempe kreas la eblon, ke okazos io neantaŭvidebla.

Lo Jacomo: *Vi tiel trafas gravan demandon: la ideo devigi Esperanton. Eĉ la esperantistoj, laŭ mi, ŝanĝis sian opinion ĉi-rilate, multaj ne plu planas devigi Esperanton, sed simple faciligi ties lernadon por tiuj, kiuj deziras studi ĝin, kio tute ne estas la sama afero.*

Nun oni konstatas malinklinon, ekzemple, al instruado de Esperanto en lernejoj. Tamen la lingvoj instruataj en la lernejoj ne estas devigataj, sed proponataj: kial oni ne proponus inter ili ankaŭ Esperanton?

Koncerne konkurencon inter la angla kaj Esperanto, tio iel similas laŭ mi la konkurencon inter biciklo kaj aviadilo. Estas klare, ke aviadilo kaj biciklo ne situas samnivele kaj ne konkurencas unu la alian. La ekzisto de aviadiloj ne forigas la bezonon je bicikloj. Kaj iamaniere, Esperanto partoprenas en ia lingva ekologio.

Ertl: *Tion oni tre klare vidas konsiderante, ke antaŭ dudek aŭ tridek jaroj la slogano: “Esperanto, dua lingvo por ĉiuj” aperis ofte en esperantistaj medioj, dum nun ne plu temas pri tio. Oni ne plu diras, ke Esperanto estas nepre por ĉiuj: Esperanto estas por tiuj, kiuj ja deziras ĝin, kiuj kredas ĝin utila.*

Eco: Ĉi-rilate ekzistas alia argumento – pri kiu mi jam parolis dum miaj lekcionoj, sed kiu ankoraŭ ne aperis en la nuna diskuto –, argumento prezentita kontraŭ ĉiu internacia lingvo jam de post Fontenelle;⁸ neniuj registaro havas avantaĝon en subteno de internacia lingvo tiusence, ke ĝia avantaĝo estas male disvastigi sian propran lingvon. Tiu ĉi argumento eble ŝanĝiĝas hodiaŭ. Nome, hodiaŭ la egoismo mem de la registaroj povus sugesti al ili favori Esperanton. Kial?

LA LINGVA POLITIKO

Mi ja vidas, kio okazas nuntempe en Francio. Pro la temo elektita por mia kurso, min oni evidente kaptis por amaso da kunvenoj, kongresoj ktp, ĉar post Maastricht leviĝas ĉi tie la problemo de la sorto de la franca lingvo kaj, **ŝajne**, de la granda timo al la angla lingvo. Sed mi rediras al miaj francaj geamikoj: permesu, ke mi psikanalizu vin. Vi daŭre parolas pri la angla, dum via obsedanta fantomo estas ja la germana! Vin premas la timo, ke estontece estos ne la angla, sed la germana. Tiagrade, mi diras, ke vi estus pretaj, post mallonge, favori planlingvon por malhelpi alian lingvon enradikiĝi. Mi opinias tion vera. Eble estas ankoraŭ tro frue, sed ni eble atingos tion. Tiam, ĉiuj rezistoj de publikaj instancoj, pro la menciita kialo, povus ŝanĝiĝi.

Sed kiel oni planu tion – jen interesa problemo por vi –, kiam la registaroj eĉ ne kapablas gvidi seriozan kaj ekvilibran politikon rilate ekzistantajn lingvojn? Mi mencias kelkajn interesajn faktojn: pasintsemajne okazis en Itala Kultur-Instituto debato pri la instruado de la itala en Francio. Prelegis francaj leksikologoj kaj unu itala lingvisto: Tullio de Mauro, kiu preskaŭ ĉiam laboris pri la historio kaj la disvastiĝo de la itala lingvo, kaj kiu prezentis tre interesajn faktojn. Li kalkulis la loĝantaron de ĉiu lando, la lingvo-parolantaron, t.e.: aldonante al la francoj la belgojn . . .

Lo Jacomo: . . . *francparolantajn* . . .

Eco: . . . la malnetan nacian produkton de ĉiu lando – tre gravan ĉar signifan pri komercaj rilatoj – same kiel aliajn indicojn. Kaj, ĉu en Italio ĉu en Francio, eblas konstati, ke la distribuo de la lingvo-instruado en la lernejoj ne respondas al tiuj ĉi realaĵoj. Ekzemple: la loĝantaro kaj la malneta nacia produkto de Hispanio estas malpli altaj, ĝis nun, ol tiuj de Italio – multege koncerne loĝantaron, sed ankaŭ koncerne malnetan nacian produkton. Tamen, en Francio, fronte al, ni diru, 30 % da instruado de la hispana lingvo, estas nur 2 % da instruado de la itala. Svarmas la instruado de la angla, kaj kompare la germanan oni tre ete instruas – malgraŭ grandegaj loĝantaro kaj ekonomia potenco.

Lo Jacomo: *Jes ja, se konsideri la problemon nur je la eŭropa nivelo.*

Eco: Evidente! Ne la loĝantaro de Britio gravas, eĉ ne la usona, sed ekzemple la angloparolantaj japanoj.

Lo Jacomo: *Koncerne la hispanan, mi aŭdis en Unesko, ke tiu ĉi lingvo atingis en Usono tian gravecon, ke oficistoj de Unesko multe pli ofte uzas la hispanan ol la francan.*

Eco: Fakte. Sed imagu, ke vi fariĝus diktatoro de la franca ŝtato kaj bezonus pro tio plani, ĉar estontece vi bezonos difinitan nombron da personoj kapablaj rilati kun Germanio, alian nombron kun Bulgario . . . Tute evidente, vi estus devigataj kalkuli, se temas pri plano, ke el cent francaj infanoj, oni bezonas ja, ke ĉiuj lernu la anglan, sed oni ankaŭ bezonas, ke 40 % lernu la germanan kaj 2 % la bulgaran. Nu, la situacio nuntempa ne obeas tian raciecon.

Same en Italio: oni konstatas tie, ke instruado de la angla kaj de la franca situas samnivele. Nu, en la nuna historia tempo, evidente necesus instrui pli da angla. Kial do tiu instruado de la franca? Pro historiaj kialoj, kulturaj tradicioj preferataj al praktikaj bezonoj.

Se do la ministerioj pri edukado en la tuta mondo ankoraŭ ne kapablas, laŭvide, plani la fremdlingvan instruadon, kiel vi imagas planon por instrui Esperanton? Jen problemo.

Lo Jacomo: *Tio ĉi pensigas min pri tre ĝenerala problemo: ĉu la sistemo servu la individuon aŭ la individuo la sistemon? Koncerne lingvojn, ĉu ni diru, ke individuo apartenas al lingvo aŭ lingvo al individuo? Ĉar opiniante, ke lingvo apartenas al individuo, ni forigas la neceson plani fremdlingvan instruadon, necesas proponi la eblon studi ĉiujn lingvojn, kaj fidi la merkatajn leĝojn . . .*

Eco: Sama kontraŭdiro ekzistas inter inklina elekto kaj gvida plano en universitata instruado. En Italio, tipe, grandega kvanto da studentoj elektas la fakon beletro-filozofio – kredante ĝin pli facila –, aŭ eĉ juron . . . kaj ili utilos je nenio, ĉar ne estas sufiĉe da postenoj, dum mankas ekzemple geologoj.

Ne eblas kontraŭi personajn inklinojn: se iu devigus min studi geologion anstataŭ filozofion, mi estus tre malfeliĉa. Sed eblas konstrui instigajn planojn: se vi ne havas sufiĉe fortan inklinton – mi ja havis sufiĉe fortan inklinton al filozofiaj studoj, sed inter la centoj el miaj studentoj, kelkaj venis tien pro pura hazardo –, tiam mi instigas vin iamaniere studi geologion.

Vi vidas, ke tiel eblas samtempe respekti ĉies inklinton kaj plani la fremdlingvan instruadon ne estante diktatoroj. Same kiel eblas, ĉirkaŭ la 15-a de aŭgusto en Italio⁹, instigi al uzado de neĉefaj vojoj, sciante ke alikaze estos kelkaj centoj da mortintoj pli. Neniun oni devigas uzi la neĉefan vojon, sed oni reklamas ĝin dirante: ha, kiel bele sur neĉefa vojo, kiel pli trankvile . . . kaj tio pli-malpli funkcias, kelkaj personoj diros: konsentite, tion mi elektas. Samon eblas fari koncerne lingvojn.

PLURLINGVISMO KAJ MONDPERCEPTO

Ertl: *Ŝajnas al mi, ke la graviĝanta ideo nuntempe, koncerne edukadon, estas plurlingvismo. Claude Hagège, ekzemple, pledas por ĝi en sia lasta verko.¹⁰ Sed mi diru, ke temas pri eliteca vidpunkto. Simpla aserto, ke necesas lerni plurajn lingvojn, enrudus laŭ mi tiom da ŝanĝoj en la edukita sistemon, ke inercia sistemo ne kapablas adaptiĝi, aŭ ne kapablas fari tion ene de la necesaj templimoj.*

Eco: Ni tamen distingu, kio estas saĝa, kio estas ebla kaj kio dependas de la inercio de la sistemo. Estas klare, ke ĉie en la mondo oni instruas lingvojn plej aĉe, freneze . . . oni komencas kiam la knabo aŭ knabino estas 14- aŭ 15-jara, kvankam la ĝusta aĝo por eklerni lingvon estas la 3-jara aĝo. Pro la freŝeco de 3- aŭ 4-jara infano, se oni kontaktigas lin kun fremda lingvo, pŝŝt!! post du monatoj li kapablas paroli . . . Do eblas pripensi enkondukon, mi emus diri en antaŭlernejo, almenaŭ en elementa lernejo, de fleksa instruado de fremdlingvoj, kiu celus, ne ke post tio la infanoj scipovu la lingvojn, sed ke ili sciu pri la diferenco inter la lingvoj, sciu ke ili estas diversspecaj . . .

Ertl: . . . *sentivigon* . . .

Eco: Tion mi konsentus. Iom malpli da geografio: nuntempe televido jam sciigas, kie situas Kalikato kaj kiel nomiĝas la iraka ĉefurbo – sciaĵoj, kiujn mi ja devis studi, dum nunaj buboj lernas ilin televide –, kaj pli da lingvoj en la lernejo. Ni tiel havus generacion plurlingvan ne en la senco, ke ĝi ja scipovus plurajn lingvojn, sed laŭ kultura vidpunkto, generacion sciantan, ke iu vorto estas nur unu inter pluraj direbloj . . .

Mi opinias, ke eĉ por esperantisto tio povus esti maniero pli bone prepari homojn akcepti eĉ interlingvon. Kaj atinginte tion, kial ni ne instruu al knabo, inter aliaj lingvoj, ankaŭ kelkajn nociojn pri Esperanto? Komencante tre, tre, tre frue, antaŭ ol li kapablas lerni aritmetikon aŭ historion, ĉar tiam estas ja la konvena aĝo! Tia plurlingvismo, ne la plurlingvismo de poliglotoj, sed tiu de kulturuloj, pro kiu mi konas kelkajn vortojn el la rusa – kvankam mi nenion komprenas nek parolas, tio ja helpas, en kelkaj situacioj, kompreni la rusan spiriton –, ŝajnas al mi sufiĉe defendinda.

Ja estis argumento de Komensky,¹¹ laŭ kiu eĉ Cicerono ne plene scipovis la latinan gramatikon. Temas ne pri plenplena instruado de la lingvoj, sed pri ludado je lingvo-komparo. Tre facilas, kiam oni instruas al iu la anglan lingvon, pere de Chomsky-aj arboj,¹² profundaj strukturoj kaj sintaksaj diferencoj, montri, ke en la franca kaj en la hispana tio funkcias malsame. Persone mi opinias, ke paralela instruado de lingvoj ege gravas por koni la diversajn pensmanierojn. Poste, vi ja parolos nur unu lingvon, sed vi havos ideon pri la aliaj; kompreni kial la germanoj lokas la verbon en malsaman pozicion ol la francoj, estas esenca scio, eĉ se oni ne parolas la lingvon mem . . . mi mem ne parolas la germanan, sed mi havas ideon pri la sintaksa strukturo de la germana.

Lo Jacomo: *Ĉi-rilate, mi volus fari du demandojn. Koncerne plurlingvismon, ĉu ja eblas aserti, ke normala persono kapablas lerni plurajn lingvojn? Fakte kuŝas tie problemoj: vi mem kapablas utiligi plurajn lingvojn, sed ĉu tion povas meza homo?*

Dua demando mia estas, en la kazo de lingvo-instruado en elementa lernejo – ĉar jam temis pri tio antaŭ kelkaj jaroj, mi memoras pri diskuto koncerne ĉi-rilatajn ministeriajn planojn – : kiuj instruos? Ĉu instruisto en elementa lernejo kapablas instrui lingvon, aŭ ĉu necesas venigi instruistojn el ekster la elementa lernejo por tiu ĉi lingva instruado?

Eco: Kompreneble jes. Mi ja opinias, ke lingva talento similas matematikan talenton. Ekzistas homoj, por kiuj lingvoj ege facilas, kaj aliaj ne. Persone mi senkapablas pri matematiko: tio ne malhelpas, ke mi iom komprenas se temas pri kalkulado ktp . . . aŭ eĉ se mi havas okazon legi tekston koncerne problemojn

pri ĝenerala topologio: ne ĉion mi komprenas, sed la malmulto da matematiko, kiun mi lernis, ege malbone, ne praktikante, helpas min kompreni, pri kio temas.

Same estus pri lingvoj. Se oni komencus jam en infanaĝo, estiĝus homoj kapablaj majstri plurajn lingvojn, aliaj ne. Sed al ĉi-lastaj restus pli-malpli gusto, odoro je plurlingveco, kio laŭ mi estas la esenca ilo de interpopola kompreno. Mi ne diru: de toleremo, ĉar tio ne veras, kelkaj interbuĉiĝis parolante la saman lingvon – kaj tio ja povus esti argumento kontraŭ la universala lingvo –, se konsideri la hispanan revolucion aŭ la usonan intercivitanan militon . . .

Ertl: *Kaj ĉi-rilate, mi ŝatus reveni al aludita temo, la koncepto de Whorf: estas klare, ke malantaŭ ĉiu lingvo estas ja maniero percepti la mondon. Sed ĉu vi opinias, ke ankaŭ malantaŭ Esperanto estas maniero percepti la mondon? Se vi permesos, ke mian propran sperton mi menciu, Esperanto, pro sia naturo mem, estas prefere interŝanĝejo inter diversaj manieroj percepti la mondon: komunikante en Esperanto, oni estas preta akcepti aliajn vidmanierojn, krome oni multe pli komunikas pri komunikado, ĝi pli memrilatas ol aliaj lingvoj. Tio do ankaŭ iĝas maniero lerni toleremon, lerni kiel aliaj komunikas.*

Eco: Mi ne kapablas respondi, ĉar Esperanton mi ne parolas, kvankam ĝian gramatikon mi studis. Kiel kaj kiom lingvo strukturas onian vidmanieron, tion oni lernas iom-post-iome, parolante la lingvon kaj komparante. Mi do ne povus proponi al vi respondon. Mi povus konsenti, ke miksitaj, bastarda lingvo, kiel ajn vi nomus ĝin, kiu pruntis leksikajn kaj sintaksajn strukturojn el malsamaj lingvoj, reduktus la apartaĵojn de la fontlingvaj mondperceptoj. Sed se temas pri serioza lingvo, pri lingva universo, mi suspektas, ke iamaniere ĝi trudas ian vidmanieron. Mi ne scias kian, sed principe – laŭ pure teoria vidpunkto – ĝi ja devus trudi iun.

Cetere, kvankam mi akceptas la starpunkton de Whorf, ĝin mi akceptas nur modere. Ni ĝissate aŭdis la nepre pritraktendan ekzemplon koncerne la eskimojn kun siaj kvar vortoj por neĝo: se vi klarigas al iu eskimo, ke por vi temas pri la sama neĝo, li tre bone komprenas. Tio signifas, ke se ja ekzistas ia skafaldo konstruita de la lingvo, same ekzistas konstanta metalingva¹³ eblo eliĝi el ĝi. Alie, Whorf tute ne kapablus klarigi al ni, kial la hopioj rezonas alimaniere, kvankam, post kiam ili eniĝis la angloparolantan komunumon, eĉ se ne plene integritaj, ili komprenas pli-malpli la rezon-manieron de la angloparolantoj.

Tiel, ke la Whorf-an koncepton, kiun ni ja konsideru serioza, mi ne akceptas tiel komplete kiel Quine¹⁴; ekzemple lian ĉioman, totalan vidpunkton pri neebleco de radikala tradukado. Jes ja, se “radikala traduko” signas teoriant noción, radikala traduko inter lingvoj ne eblas. Sed praktike, nu, oni elturniĝas.

Ekzemple mi ofte asertas, ke probable 80 aŭ 90% de la homaro legis

Milito kaj paco de Tolstoj en traduko. Tio ne malhelpas, ke kunigante japanon kaj svedon, kaj paroligante ilin pri *Milito kaj paco*, oni konstatas, ke kun konvena proporcio ili havas la samajn ideojn kaj la samajn reagojn. Kompreneble, ili maltrafis kelkajn stillertaĵojn, sed praktiko instruas, ke oni elturniĝas, do ke tradukado eblas.

Tamen per tio mi ne prirespondis vian demandon: ĉu Esperanto estas malpli dogmeca ol aliaj lingvoj . . .

Ertl: *Ni ja scias, ke Esperanton vi ne praktikis, kaj do ĉefe teorion vidpunkton ni atendas de vi. Sed, laŭ teoria vidpunkto, ĉu vi konsentas, ke internacia helplingvo, kia ajn ĝi estus, eĉ se natura lingvo, devus pli taŭgi por interpretado de aliaj vidmanieroj al la mondo? Mi ja celas, ke se oni akceptus, ekzemple, la anglan, la portugalan aŭ alian lingvon kiel internacian ĉeflingvon por ĉiuj interrilatoj, ĉu oni devus percepti la mondon pli portugale, pli angle . . . ?*

Eco: Jes.

Ertl: *Sed principe povus estiĝi interŝanĝejo pli neŭtrala, la lingvo mem devus esti pli taŭga por interpretado de aliaj lingvoj. Ĉu utopie?*

Eco: Ne! Refoje tio ŝajnas al mi pli praktika ol teoria eblo, pro la principo: se Esperanto estas lingvo, ĝi ankaŭ estas vidmaniero al la mondo. Sed nu, se specialiĝas tiu ĉi lingvo, se ĝi fakiĝas kiel konstanta tradukejo de aliaj lingvoj, kiel renkontiĝejo, tiam mi opinias, ke ĝi povus pli ol alia taŭgi por kompreno kaj komprenigo de la diversaj vidpunktoj. Ĝi povus fariĝi Honkongo de la situacio – aŭ Kasablanko, por fideli miajn amojn. Ekde kiam urbo iĝas internacia interŝanĝejo, estas normale, ke tie ĝermas eblo je pli profundaj kontaktoj kun malsamaj kulturoj . . . Fakte, mi kredas tion praktike ebla.

Lo Jacomo: *Kion vi opinias pri la distingo, kiun kelkaj lingvistoj kiel Claude Hagège proponas inter la angla kaj la uson-angla, dum aliaj rifuzas ĝin? Ĉu laŭ vi temas pri la sama lingvo, aŭ pri malsamaj lingvoj?*

Eco: Vi ja scias, ke tre malfacile estas por lingvistoj proponi distingon inter lingvo kaj dialekto, kaj difini, kiam dialekto akiras lingvan rangon.

Ĉu la venecia estas lingvo? Sociologie eblas respondi: ĝin oni uzis en la tempo de la Venecia Respubliko por oficialaj aktoj, kaj literaturo ekzistas en tiu ĉi lingvo, tiel ke la venecia ja estas lingvo, dum la dialekto de mia urbo ne estas tia: ĝi havas tro malmulte da literaturo kaj ĝin oni neniam uzis en oficialaj dokumentoj; temas leksike pri parazito de la itala.

Tamen, laŭ mi, la uson-angla kaj la angla estas ja la sama lingvo, kun eĉ ne dialektaj, sed nur stilaj diferencoj.

Lo Jacomo: *Kaj koncerne la percepton de la mondo, ĉu ili kunhavas la saman mondo-percepton?*

Eco: Nu . . . se agnoski, ke lingvo diktas aŭ favoras mondpercepton, ni agnosku la ideon, ke tion ĝi faras tra siaj sintaksaj strukturoj, tra la riĉeco aŭ malriĉeco de sia vorttrezoro, aŭ eĉ tra prononcado, akcentado kaj amaso da aliaj ecoj. Probable do ekzistas Oksforda percepto de la mondo malsama ol la mondpercepto de la angla parolata en Teksaso.

Ertl: *La esprimo “More to come” spegulas alian manieron percepti la mondon ol la Oksforda mondpercepto.*¹⁵

Eco: En tiu ĉi kazo, mi taksas la diferencon malpli lingvistika ol socilingvistika en la senco de Bernstein.¹⁶ Ekzistas diversaj niveloj de lingva uzado, sed estas evidente, ke la itala de senkulturulo estas malsama ol la televida itala nun parolata. Temas pri sociaj, stilaj diferencoj, ja tre gravaj sed, mi emus diri, ne vere lingvaj.

Ĉi-rilate, mi spertis ion pasintsemajne. En Italio, oni enkondukis samtempan elsendadon de punprocesoj. Temas pri juĝisto, kiu nuntempe estas la itala heroo, ĉar li enkarcerigis ĉiujn, oni elsendis proceson kies prokuroro li estis. Estis mizera proceso de familio da friponoj, kiuj konfuze interbatalis, ino mortis, en situacio . . . unu estis drogulo, la alia . . . nu do, jen la situacio. La prokuroro parolis italan lingvon, kiun kritikistoj ne taksis bona; konkretan italan li parolis: “Respondu, ne respondu, mi volas scii tion”. Kaj la alia, la fripono, kiu jam spertis karceron, profesia rabisto el la kanajlaro, parolis la televidan italan. Kiĉan sed tre elegantan . . . kun ĉiuj kliŝoj uzataj por amora rilato, belan . . .

Li klarigis sian situacion, tiun de sia familio – stranga familio, en kiu mi ne komprenis kiu amoris kun kiu, iel interplekte . . . – dirante: “**Ah, il nostro era un rapporto stupendo!** [Ah! nia rilato estis eminenta]”. Tiajn vortojn oni uzas en la sentimentala gazetararo. Ambaŭ parolis itale, sed la akuzato, socie suba, parolis ŝajne pli elegantan italan, pli bele strukturitan. Tiu ĉi falsa kaj artefarita itala, la itala de la sentimentala gazetararo, fariĝis por li maniero percepti la mondon, aŭ eble maniero malpercepti ĝin. Anstataŭ diri: “mia edzino estis putino, ŝi amoris kun mia kamarado”, li diris: “eminenta rilato”.

Mi celas, ke montriĝis du mondperceptoj interne de unu lingvo, kiuj diferenciĝis je stila nivelo, kun jena paradokso ke, ĝis hieraŭ, la pli eleganta lingvo estis parolata de tiuj, kiuj havis la povon, kaj la pli malriĉa de la mizeruloj, dum subite parolis la pli artefaritan kaj elegantan lingvon la mizerulo, kvazaŭ simbole de sia mizereco.

LA FENOMENO ESPERANTO

Lo Giacomo: *Finfine, dum kuitime lingvo trudas iun mondpercepton, ĉu ni ne diru, ke ĉe Esperanto la instigo lerni venas de iu mondpercepto? Pli precize,*

ke la maniero kiel individuo sentas sin rilate la mondon igas lin serĉi ion alian, instigante al lernado de Esperanto?

Eco: Jen la alia flanko de la problemo, kaj unu el miaj malkovroj dum la menciitaj lastaj ses monatoj estis precize tiu ĉi. Mi ja agnosku, ke kompare kun aliaj projektoj je perfekta lingvo (unue perfekta, poste internacia lingvo), ekzistis malantaŭ Esperanto ideologio, pacema ideologio, kiu ludis gravan rolon: ĝi klarigas, kial tiu ĉi lingvo rezistis dum la aliaj fiaskis. Ja estas vera, sociologia konstato: ekzistas esperantista “religio”, kiu puŝas la homojn lerni kaj paroli la lingvon, dum ne ekzistas volapuka “religio”, nek ida nek . . .

Tion ĉi mi provis kompreni kaj klarigi. Tio devenas klare de la personeco mem de Zamenhof, de la socia, kultura kaj rasa situacio, en kiu li naskiĝis. Jen elemento laŭ mi tre atentinda, kiu klarigas la disvastiĝon kaj la rezistemon de la lingvo.

Estas vere, ke same kiel barbaro estis instigita lerni la latinan, ĉar ĝi estis maniero fariĝi Romia civitano, sekve enkondukiĝi en revindan civilizacion, same povas esti idealaj impulsoj logantaj al lernado de iu lingvo, kaj certe pli fortaj ol tiuj, kiuj hodiaŭ kondukas nin al lernado de la angla, kies kialoj estas nur praktikaj. Tio grave rolas.

Ĉiam fascinas min la fervoro rimarkebla ĉe studentoj pri la itala en usonaj universitatoj. Kial do usonano devus dediĉi sin al studado de la itala? Malantaŭ tio mi malkovras fortajn idealajn impulsojn: historio pri arto, strebo kompreni kelkajn aspektojn el ĝi; la itala estas la lingvo, kiu ebligas kompreni la skribajn verkojn mem de Rafaelo . . . Estas do foje, eĉ ofte, idealaj kialoj por lernado de lingvo, evidente.

Lo Jacomo: *Esperanton eblas konsideri diversmaniere: unue temas pri projekto, poste pri lingvo, kiu transiris tiun ĉi projektan staton akirante lingvistikan civitanecon, interalie pro la problemo de la evoluo de Esperanto – projekto mem ne evoluas, dum Esperanto estas ja lingvo, kiu evoluas eĉ ne rimarkate. Krome, eblas paroli pri la fenomeno, pri ĉio sociologie kaj psikologie ligita al Esperanto kaj la kialoj de ĝia funkciado. Kiu el tiuj ĉi diversaj aspektoj aparte interesas vin?*

Eco: Ne estas facile por mi respondi. Ĉar kiam mia amiko Zinna faris la Hjelmsevan analizon de Esperanto,¹⁷ mi eksciis aferojn, kiujn mi ne konis. Sekve, Esperanto povus interesi min iam kiel mekanismo, tra sia lingva aspekto. Sed ĝis nun, tian laboron mi ne faris sufiĉe.

Kompreneble, ĝi pli interesis min pro siaj historio kaj ideologio, kiuj per si mem estas interesaj fenomenoj. Kaj jen la miskonata flanko. Homoj daŭre pensas pri Esperanto kvazaŭ proponata ilo: ili nenion scias pri la ideala impulso,

kiu animas ĝin. Mi demandas min, kial oni tiom malmulte konas ĝin, ĉu pro via kulpo?

Same kiel estas malmulte da personoj, kiuj konas la pensojn de Kantio, same malmultaj konas la esperantistan ideologion. Sed ekzemple mi iĝis kaptita legante la biografion de Zamenhof pli ol legante la gramatikon de Migliorini.¹⁸ Kio signifas: eble indus pli bone konigi ĝin . . . Kial neniam troviĝis – dum ekzemple pri la historio de s-ino Curie ja estis ĵusa filmo – filmo pri tiu persono? Mi ja demandas min, ĉar li ja estas sufiĉe fascinanta por krei historion.

Lo Jacomo: *Eble pro mona problemo . . .*

Eco: Ne tion ĉi ni debat. Nu fine, responde al via demando, la historia-ideologia flanko de Esperanto restas draste nekonata.

Ertl: *Cetere ni diru, ke ne nepre pro ideologiaj kialoj oni iĝas esperantisto. Eble ni konsideru paralelecon inter juda identeco kaj esperantista identeco: ne eblas diri, ke ekzistas aro da devigaj kriterioj por esti judo. Same pri Esperanto. Eblas esti esperantisto, ĉar ĝin oni parolas, sed ankaŭ se ĝin oni malbone parolas, tamen akceptas ĝiajn idealojn. Vi eble opinias, ke ja la ideologio . . .*

Eco: Ne, “ideologion” mi celis kun tre vasta senco, kiel aron da ideoj, opinioj, mi diru . . . Mi estas kolektanto de malnovaj libroj. Estas ja ideologio de kolektantoj de malnovaj libroj. Tion oni faras pro kelkaj kialoj: la beleco de la objekto, la emo al esplorado, ia rilato estiĝanta inter kolektantoj kaj librovendistoj, oni korespondas. Estas ideologio . . . ja tre limigita, sed sufiĉa por krei amikecojn kaj eblojn interkompreniĝi. Kaj do, “ideologion” mi ne celis kun senco . . .

Lo Jacomo: . . . *dogma . . .*

Eco: . . . dogma. Prefere mi celis la sencon, kiun angloj kaj usonanoj donas al **philosophy**, parolante pri la **philosophy** de firmao, **philosophy** de skolta asocio . . . Mi diru, ĝenerala orientiĝo konsistanta el afekciaj kaj intelektaj eroj. Kaj mi insistu, ke kun tiu ĉi senco, ekzistas ja ideologio de Esperanto. Alkaze ne estus ĉiuj ĉi revuoj ktp., nur estus vendado de lernolibroj, kaj jen ĉio. Eĉ la ideo traduki ĉiujn verkojn de la monda literaturo devenas de ideologio, ne de praktika neceso. Mi vidis, ke oni tradukis Giacosa aŭ De Amicis:¹⁹ ne diru al mi, ke la mondo bezonis tion . . . Traduki Giacosa, malgravajn verkistojn, estas elemento de ideologio . . . tute ne komparebla kun tradukado de la Enciklopedio aŭ de Ŝekspiro.

Lo Jacomo: *Precize, Esperanto estas tia malofta lingvo, koncerne tradukadon, en kiu plejmulto el la tradukoj estas farita el la gepatra lingvo al Esperanto. Mi eĉ aŭdis profesion tradukiston aserti, ke por li estas pli facile traduki el la gepatra franca lingvo al Esperanto ol inverse. Kutime, koncerne*

tradukadon el unu lingvo al alia, oni ne asertas tion. Pro tio, esperantisto utiligas Esperanton por konigi sian propran identecon al la tuta mondo, t.e. precipe laŭ aktiva maniero. Tio komprenigas, ke oni klopodas traduki verkojn eĉ principe malgravajn, sed konsideratajn de oni mem kiel gravajn: jen maniero esprimi sin.

Eco: Jes ja, kaj povas esti nereкта maniero uzi ideologion.

Lo Jacomo: *Tie kuŝas la diferenco kun aliaj planlingvoj, esence pasivaj, kiel Interlingua, en kiuj regas la opinio, ke tra la mondo nur deko da personoj havas ion por diri, aliaj bezonas nur legi, kaj do se kvin miliardoj da homoj legas kaj dek verkas, jen universala lingvo: tia estas la ideologio de Interlingua. Kontraŭe al tio, Esperanto asertas: ĉiu ajn havas ion por diri. Kaj precize tie kuŝas la ideologio de Esperanto, kiu laŭ mi estas ligita al la koncepto “rajto je diferenco”. Se ni ne estus malsamaj, nenion ni havus por diri unu al la alia, sekve nia diferenco mem estigas la bezonon je komunikado, je esprimiĝo. Kion vi opinias pri tio?*

Eco: Tre interese. Ion pli vi sciigis al mi . . . Nu, oni tradukas Giacosa kaj De Amicis ne nur por pruvi, ke la lingvo kapablas ĉion traduki, sed ĉar necesas doni al ĉiuj eblon esprimiĝi. Tion mi trovas tre interesa . . . tre ideologia! Estas ja filozofio . . . Bedaŭrinde, tio funkcias nur por esperantistoj: mi celas, ke tradukado de Giacosa esperantlingven utilas nur al esperantistoj, ne al aliaj.

Ertl: *Estas tamen izolaj kazoj, kie oni uzis Esperantlingvan tradukon por poste retraduki, sekve Esperanto funkciis kiel ponto . . .*

Eco: . . . kiel peranto.

Ertl: *Jes ja, peranto. Tio koncernis ĉefe la ĉinan lingvon, ekzemple, kaj lingvojn tute malgrandajn aŭ malproksimajn. Bedaŭrinde, tio okazas malofte.*

Kaj mi opinias, ke tiu ĉi fakto, ke oni multe kaj sufiĉe facile tradukas en Esperanton el la propra lingvo, konsistigas, refoje, tre interesan esplortemon. Mi diru, ke lingvaj normoj en Esperanto estas malpli rigidaj ol en aliaj lingvoj, kio rolas jen bone jen malbone. Tradukante el iu lingvo, oni nepre trudas iujn normojn el tiu lingvo, tio rezultas el la malrigideco de Esperanto.

Ekzemple, mia gepatra lingvo estas la hungara. Tradukante el la hungara, plej ofte, mi povus konservi la saman vortordon. Sed tio ne nepre estas stile ideala. Mi celas, ke bona tradukisto, kiu tradukas en Esperanton, ĉiam klopodas trovi ekvilibron inter kohereco de la origina teksto kaj la normoj de Esperanto. Sed tiuj ĉi normoj estas malpli rigidaj ol en aliaj lingvoj.

Eco: Kaj diru, se mi legos vian Esperantan tekston hungare pensitan, ĉu mi havos la impreson, ke estas malbone verkita teksto, aŭ ĉu mi povos tre bone kompreni senembarase? Kion vi spertas?

Ertl: *Jen la demando. Tio krome dependas de la kapablo de la tradukisto: kion li lernis, kion li legis. Se li legis 200 esperantlingvajn librojn, li posedos bonan stilan ekvilibron. Tamen mi donu konkretan ekzemplon:*

*Eĉ en Esperanto, la normala vortordo estas: Subjekto – Verbo – Objekto: **Mi – amas – vin**. Se mi diras: **Mi – vin – amas**, mi iom akcentas “vin”, tamen ne nepre. Kaj jen kuŝas tikla punkto de Esperanto: ĉar eĉ inter la bonaj Esperanto-parolantoj, kelkaj ne konsideros la vortordon: **Mi – vin – amas** akcentita. Al ili ĝi aspektos natura, eble ĉar en iliaj gepatraj lingvoj tia estas la natura vortordo. Mi opinias, ke temas pri tikla punkto.*

Tio dependas krome, mi diru, de la sociologia dispartigo de la esperantistoj. Iuj uzas bonan stilon, aliaj ne tre, tiuj ĉi estas pli influataj de skemoj el la propra lingvo.

Lo Jacomo: *Fakte temas pri problemo je toleremo. Multaj lingvistoj rimarkas, ke en Francio, kie plurlingvismo estas konsiderata kiel escepto, oni opinias, ke normala homo scipovas **unu** lingvon. Tamen tiu ĉi situacio estas mem iel escepta, tiusence ke en la plejmulto el la landoj tra la mondo oni konsideras normala scipovon de pluraj lingvoj, oni scias ke la saman aĵon eblas nomi per pluraj vortoj, eĉ se temas nur pri dialektaj variaĵoj: neniel mirigas, ke sama objekto havas plurajn nomojn. Sed ja en Francio tio mirigas, ĉar nin oni edukis kun tia konformismo . . .*

Eco: Same en Anglio. Francio kaj Anglio.

Ertl: *Krome estas la koncepto pri la “ĝusta vorto”.*²⁰

Lo Jacomo: *Mi tute ne estas spertulo pri la angla lingvo – sed iu rimarkigis, ke pri parolmaniero la francoj multe malpli toleras erarojn ol la angloj. Se via angla lingvo estas komprenebla, tiuj ĉi ne riproĉas viajn erarojn.*

Eco: Ne. Usonanoj sendube. Angloj, antaŭ dudek jaroj, ankoraŭ estis tre postulemaj; nun ili tute rezignis kaj tiusence usoneciĝis. Grandega estas la toleremo.

Lo Jacomo: *Nu precize, ankaŭ en Esperanto estas tia toleremo. Kaj iu rimarkigis, ke tie eble kuŝas unu el la kialoj, pro kiuj la angla disvastiĝis pli ol la franca. Nome la fakto ke en la koloniitaj landoj homoj ne kuraĝis paroli franclingve, ĉar ĉiufoje, kiam ili eraris . . .*

Eco: . . . ili estis diskriminaciaj.

Lo Jacomo: . . . dum ili multe pli facile kuraĝis paroli la anglan lingvon, ĉar en tiu ĉi lingvo iliaj eraroj estis tolerataj.

Eco: Tion mi taksas vera. Alia kialo estas, ke en la angla, por ĉiu aĵo estas preskaŭ ĉiam du vortoj: latina radiko kaj anglo-saksa radiko. Tio ebligas al homoj el malsamaj lingvaj tavoloj paroli ĉiu sian anglan. Ekzemple, kiam mi prelegas

anglalingve, mi ĉiam impresas kiel tre kulturita persono. Kial? Ĉar instinkte mi elektas la vorton kun latina radiko, kiu estas kulture elstara. Sekve, mi impresas kvazaŭ mi konus pli da vortoj, dum mi fakte konas malpli, sed mi elektas la pli malfacilajn, kiuj por mi estas la pli facilaj.

Fakte . . . mi opinias, ke estus pli malfacile fari piĝinon²¹ el la franca lingvo. Estas ja kreolaĵoj . . . sed oni efektive sukcesis, per piĝino, fari el la angla aglutinan lingvon. Piĝino enhavas aglutinan principon. Tio ne eblus kun la franca, nek kun la itala, verŝajne ankaŭ ne kun la germana.

Rimarku la kapablon de la angla lingvo, tre unusilaba, elfari onomatopeajn neologismojn (**splashdown**,²² aŭ similaj aferoj). En la franca kaj en la itala, tio levus problemojn. Do probable ekzistas internaj kialoj por la fleksebleco de la lingvo, kio igos malfacila anstataŭigon de ĝi.

Lo Jacomo: *Legante en Esperanto tekston kun vortaranĝo malsama ol tiu, kiun oni kutimas, eblas havi diversajn nivelojn de toleremo. Ekzistas germanoj uzantaj germanecajn konstruojn, kiujn oni mem ne uzas: ekzemple, iom longan determinan propozicion antaŭ substantivo. Principe nenio malpermesas tion en Esperanto, sed fakte mi mem ne uzas ĝin: se ĝi estas iom longa, ĝin mi lokas post la substantivo.*

Ertl: *Bonstilulo dirus: homo sidanta en fotelo, sed eblas diri: en fotelo sidanta homo. Estas stile iom nenormala, ne tre bela, tamen . . .*

Lo Jacomo: *Ja kelkaj germanoj uzas ĝin! Kaj ne aspektas ŝoke. Fakte, ni trafas tie la problemon pri komprenaj gradoj. Tiuj ĉi variaĵoj ne estas ŝokaj ĝis certa komprena grado, tamen estas klare, ke ju pli granda la postulo pri interkompreno, des pli interkonformaj devas esti la esprimo kaj ĝia enhavo. Enhavo pli malproksima al la esprimo ebligas pli grandan toleremon: ĝis certa grado oni opinias, ke la saman aferon oni esprimas laŭ pluraj manieroj, dum fakte ne estas tiel. Je la grado de profesia tradukado, ekzemple, malkovriĝas subtilaĵoj, kaj cele al tia komprena grado oni bezonas multe pli da rigoro. Mi ne scias, kion vi opinias pri tio . . .*

Eco: Fakte mi estas lernanta. Tre amuza estas tiu ĉi intervjuo, dum kiu la intervjuato parolas malpli ol la intervjuantoj!

Ertl: *Estos malbona intervjuo . . .*

Eco: . . . sed interesa dialogo . . . ekzemple, mi ne pripensis la eblecon je inversigo de la vortordo. Mi ja komprenis, ke pro la akuzativo tio eblas, sed neniam mi pripensis la diversajn gradojn je toleremo.

Cetere, venante ĉi tien vi ja sciis, ke mi ne estas spertulo pri Esperanto, kaj ke vi ne povas esperi mirigajn nivelojn.

Ertl: *Tamen eblas aŭdi neatenditajn vidpunktojn de personoj, kiuj . . .*

Eco: Jes ja . . . Mi scias, ke estas interese havi eksterajn vidpunktojn, kiuj ne estas dogme kontraŭaj . . .

LA NACIA LINGVO

Lo Jacomo: *Konstatigās nuntempe sociaj skuoj naskantaj situacion, en kiu lingvo eble estos malpli ligita al teritorio ol al speco de komunikado iasence dependa de socia integriĝo. Mi celas, ke individuo eble estos pli karakterizita per sia socia situo ol per la teritorio, sur kiu li vivas, ĉar eblas translokiĝi ien ajn en la mondo: du personoj socie proksimaj komprenos sin reciproke eble pli bone ol du personoj geografie proksimaj. Tiel ekestas nova kunteksto iel nekonata. Mi memoras pri prelego de geolingvisto, kiu demandis, ĉu daŭre ekzistas estonteco por geolingvistiko: ĉu la problemoj pri lingva dislimigo ne fariĝis draste malsamaj hodiaŭ?*

Eco: Jen interesa problemo. En mia lasta lekcio, mi menciis tiujn homojn, kiuj identigis la plurecon de la lingvoj kun la konsistigo de teritoriaj unuoj, tiel ke la lingvo utilis por konservi homojn sur la samaj teritorioj. Tio certe estis vera en la komenco, sed kio okazis dum la historio? Ekestis diversaj etnaj grupoj, kiuj lokis sin sur sama teritorio. En unua periodo, oni klopodis forviŝi ilian diferencon trudante al ili nacian lingvon. Hodiaŭ, oni malkovras, kion oni nomas “eltonditaj lingvoj”²³: libro aperis en Italio pri **La eltonditaj lingvoj**,²³ sed oni malkovras, ke tiuj ĉi eltonditaj lingvoj ne plu estas teritoriaj.

Por ne paroli pri Bosnio kaj tieaj okazaĵoj, sufiĉas pensi pri la ĉeesto de araboj en Parizo. Do, en la tempo, kiam fariĝas tre komplika la panoramo, ĉar estas la problemo de la kunekzisto de la lingvoj interne de la sama teritorio, pli kaj pli grava fariĝas la demando pri la komuna lingvo. Mi ne aŭdacas diri, ke Bosnio elirus el sia krizo se ĉiuj eklernus Esperanton, tamen estas vere, ke hodiaŭ oni pli bezonas ĝin ol antaŭe. Antaŭe, franco el eta urbo parolis sian francan kaj rajtis ignori aliajn lingvojn. Hodiaŭ, tio pli kaj pli malveras.

Nov-Jorko, ekzemple, estas tipa kazo de teritorio kie kruciĝas multaj lingvoj. Ekzistas teritoria unuo nomata Nov-Jorko – tio estas difinitaj vivmaniero, laborebloj – kaj ĝi estas tiel forta, ke iuj homoj estas allogataj al Nov-Jorko kaj aliaj homoj forlogataj. Sed jen teritorio vivanta per la plureco de la lingvoj, kun la amalgama – ne nur supraĵe – angla lingvo, kiu tamen ne estas la lingvo de nov-jorkanoj. La lingvo de la nov-jorkanoj povas esti jen la itala, jen la korea . . . tamen krome ekzistas tiu komuna lingvo, kiun ili trovis kaj kiu estas kontentiga. Neniam esperu, ke vi povos trudi al nov-jorkanoj Esperanton anstataŭ la anglan. Sama lingva diseriĝo troviĝas sur aliaj teritorioj, kie ne estas

baza lingva amalgamo. Vi ja pravas, temas pri nova fenomeno: la teritorioj eliris el si mem, la identeco “teritorio = etna grupo” komplete malaperis, kiel en Libano. Ni devos ĉu trovi solvojn, ĉu reveni al socia kaj kultura dispecigoj de la kontinento aŭ de la mondo.

Lo Jacomo: *Ĉu entute ankoraŭ eblas paroli pri naciaj lingvoj?*

Eco: Precize al tio ĉi mi ĵus respondis: ne! ne plu eblas paroli pri naciaj lingvoj. La abato Grégoire diris en la fino de la 18-a jarcento, ke la franca estas lingvo parolata de kvinono de la loĝantaro.²⁴ Iom post iom, ĝi fariĝis lingvo komuna kaj nacia. Sed nun, se ne koncerne la francan, almenaŭ koncerne aliajn lingvojn, komplete estas la dispecigo. Naciaj lingvoj estis iluzio de naciaj ŝtatoj dum la tri-kvar lastaj jarcentoj, sed eble ili ne estos la morgaŭa realo.

Enkonduku kelkajn milionojn pli da turkoj en Germanion kaj la lingva situacio fariĝos tre implika.

Ertl: *Aliflanke, bedaŭrinde iuj orient-eŭropaj ŝtatoj estas pli kaj pli naciemaj. François Lo Jacomo menciis hieraŭ la ekzemplon de la vorto “helikoptero”²⁵ en la kroata . . .*

Lo Jacomo: *Fakte, de kiam Kroatio apartiĝis de Jugoslavio, oni klopodis enkonduki novan kroatan lingvon, t.e. pli kaj pli diferencigi ĝin disde la serba lingvo. Neniu plu parolas pri la serbo-kroata lingvo, la serba kaj la kroata estas du lingvoj nun konsiderataj kiel malsamaj. Oni enkondukis novajn vortojn kaj, efektive, oni konstatas, ke tio funkcias, nome ke vortoj ŝajne mirigaj antaŭ unu jaro efektive eniris la kutiman parolmanieron.*

Ertl: *Ankaŭ eblus menci la kazon de la slovaka lingvo, kiu iĝos pli kaj pli disa de la ĉeĥa lingvo, kaj eblus proponi amason da ekzemploj.*

Lo Jacomo: *Fine, ŝajnas al mi, ke nacioj klopodas apogi sian identecon sur lingvaj, religiaj kaj aliaj bazoj.*

Eco: Jes ja, tamen ŝajnas al mi necesa distingi la etno-naciisman impulson unuflanke, kiu serĉas sian identecon tra sia propra lingvo, disde, aliflanke, la interplektiĝo pri kiu ni diskutis, pro kiu la teritorioj ne plu respondas al po unu lingvo. Evidente, estas normale, ke post ĉio okazinta en Ukrainio oni klopodas firme restarigi la ukrainan lingvon, aŭ ke eŭskoj luktas por lerni nur la eŭskan lingvon. Sed tio paralelas kun alia fenomeno: ke la koncernaj lingvoj interplektiĝas sur sama teritorio.

Mi estis en Galegio, kiel vi jam scias.²⁶ Tie estas naciisma impulso provanta devigi la galegan. Dum la Internacia Hispana Kongreso pri Semiotiko, iu plendis, ke la enkondukan prelegon oni ne faris en la galega, sed aliaj respondis, ke temas pri hispana kongreso kuniganta ĉiujn, kio pravigas

la elekton de la komuna kastilia . . . senfina diskutado. Nu, kion mi malkovris tie, subite, prenante turistajn broŝurojn kun teksto du- aŭ tri-lingva? Ke krom la obstina defendo de la propra lingva identeco, Galegio aspektas ankaŭ trilingva teritorio: kastilia, galega kaj iom da portugala eniĝanta. Vidu, estas du klopodoj sukcesantaj drame kunekzisti: la senindulga defendo de la propra identeco, kaj la akcepto, ke ne plu estas identeco inter lingvo kaj teritorio.

Ertl: *Sekve, ĉu vi opinias, ke la lingvovoreco, pri kiu emas paroli, ekzemple, la esperantistoj en la itala Radikala Partio, lingvovoreco kiun ili atribuas al la angla lingvo, ne estas reala danĝero?*²⁷

Eco: Ĉu per “lingvovoreco” vi celas, ke ĝi disvastiĝas tra la tuta mondo, aŭ ke ĝi angligas la naciajn lingvojn mem?

Ertl: *Ke ĝi angligas la naciajn lingvojn.*

Eco: Ne, tion mi ne kredas, temas pri supraĵaj fenomenoj. Kaj mi opinias, ke la itala lingvo estos multe pli influita – nerekte – per la angla pro la komputiloj ol pro la enkonduko de novaj vortoj. Mi kredas, ke la francoj tro timas la franglan lingvon.²⁸ Vorto alvenas: foje la lingvo glutas ĝin, ĝin reekzamenas, rekonstruas propramaniere; foje ĝi konservas ĝin dum unu sezono, ekestas modo, poste ĝi delasas ĝin.

Mia opinio pri la franca estas, ke la franca daŭre luktadis kontraŭ la frangla, dum la precipa modifo en la sintakso de la kulturita franca lingvo estis ja germaniĝo. La psikanalizo de Lacan, la penso de Heidegger igis, ke la hodiaŭa kulturita franca ne estas la franca de Kartezio. Ĝi estas ege pli kompleksa, pli serpenta. Tiun ĉi fenomenon de sintaksa germaniĝo neniu rimarkas en tiu ĉi lando. Ili zorgas pri anstataŭado de **software** per **logiciel**,²⁹ dum fakte temas nur pri detalo.

Kaj sekve, kio modifos la italan lingvon? Mi konsciiĝas pri tio uzante komputilon. La itala, same kiel la franca, konsistas el amaso da adverboj, kontraŭigaj konjunkcioj: tamen, sed, nu, do . . . kiuj ne eblas anglalingve, kaj jen problemoj por tradukado. Ĉe la komputilo, kiu ebligas verki tekstojn kaj poste aliordigi ilin, mi atentis, ke ne estu tiaj konjunkcioj komence de paragrafo, ĉar se mi devos aliloki la paragrafon, mi nepre kapablu ĝin rapide aliroĉi. Tio eble pliproksimigos mian sintakson al la angla lingvo. Kaj, post iom da tempo, ekestos venko de la parataksa super la sintakso.

Sed koncerne vortojn pruntitajn de la angla lingvo, mi memoras ke, en mia infanaĝo, certaj damoj uzadis amason da francaj vortoj pro pretendemo al supera kulturo. Estis do invado de francaj vortoj, kiuj poste malaperis: la lingvo tre facile solvis la aferon.

LA TIMO AL LA ANGLA

Lo Jacomo: *Laŭ vi, ĉu necesas timi la anglan lingvon?*

Eco: Fakte ne, la anglan mi ne timas, ĉar en mia profesio mi devis identigi ĝin kun interlingvo mia, do mi estas kontenta, ke mi kapablas verki artikolon en la angla, kvankam malbone, nu . . . estas toleremo . . . Kial do mi devus timi ĝin se, verkante romanon, mi rajtas verki itallingve? Mi ne estas obsedata de tio. La angla fariĝis la lingvo postmilita, la lingvo de la liberigo kontraŭ la faŝismo, la lingvo de la kino. La angla ne teruras min, kaj mi ne asertus, ke en Italio estas granda timo al la angla kiel interlingvo. Estas tro malmulte da personoj, kiuj parolas ĝin.

Lo Jacomo: *Jacques Ruffié³⁰ – kiu aktivemas por uzado de la franca lingvo – iam demandis al la Nobel-premiitoj instruantaj en Collège de France, ĉu ili opinias, ke sian premion ili povus ricevi publikigante siajn verkojn en lingvo alia ol la angla. Ĉiuj kvar respondis, ke laŭ ili, por ricevi Nobelan aŭ samnivelan premion, nepre necesas publikigi angla-lingve.*

Eco: Estas fakto.

En la pasinta jarcento, ne eblis fariĝi ambasadoro de iu lando sen scii la francan lingvon, tio absolute veras. Estas historiaj leĝoj, kiujn oni ne povas ignori. Peano volis trudi la **Latino sine flexione** kiel sciencan lingvon . . . ³¹ Por plu vivi, la internaciaj Akademioj kaj la kulturaj raportoj probable bezonas unu solan sciencan interlingvon.

Ertl: *Tamen eblas etetaj ribeloj sur kelkaj terenoj! Ekzistas ekzemple eta planto pri kiu oni verkis dikan vortaron en Esperanto,³² kaj laŭdire la kelkaj sciencistoj laborantaj pri tio kapablas legi Esperanton, ĉar tio estas esenca por ili. Sed tio povus esti iu ajn alia lingvo; mi memoras, ke dum miaj universitataj studoj oni diris al ni: “Estus bone lerni la polan lingvon, ĉar ekzistas pri tiu demando tre bona studo en la pola lingvo”.*

Eco: Mi ne instru al maljuna simio kiel grimaci – laŭ la franca esprimo; en Italio, oni ne instruas al muŝoj kiel grimpi sur muro.³³ Sed se mi estus esperantisto, mia ideo estus, ke ne tra la scienco, prilaborante Esperanton kiel sciencan interlingvon, oni sukcesos . . . Prefere estos, iasence, tra la komunumoj, la junuloj, la bezono renkontiĝi . . . nur poste ĝi povos iĝi scienca lingvo. Sed ne nur scienca . . . Ĝis la komenco de tiu ĉi jarcento, oni ankoraŭ verkis disertaciojn en la latina en universitatoj, ĉar oni opiniis, ke la terminologio kaj ĉio bezonata troviĝas en tiu ĉi lingvo. Se do necesis tiom da jarcentoj por elimini la latinan kiel lingvon por disertacioj, imagu kiom por elimini la anglan kiel sciencan lingvon!

Lo Jacomo: *Vi diris, ke tiu ĉi supereco de la angla – ĉu de la angla ĉu de alia lingvo – estas io neevitebla, ĉar oni ĉiam konstatis tion tra la historio, kaj tio pensigas min pri alia aspekto de la demando. Fakte, neniam oni sukcesis eviti militojn, kaj mi opinias, ke ne hodiaŭ oni sukcesos. Sed ĉu tio signifas, ke oni allasu aŭ ke oni tamen provu malhelpi ilin?*

Eco: Mi ripetas, prenante la starpunkton de francoj, ke se oni batalos por igi aŭ reigi la francan samnivela kiel la angla, oni ne venkos. Venko prefere venos el estigo de plurlingva konscio, atentemo al diversaj lingvoj. Nur tiam la interlingva rolo de la angla povos malpliĝi. Nuntempe, ne utilas diri: “mi volas verki mian artikolon en la franca lingvo”. Ja kompreneble, se ĉiuj francaj sciencistoj verkus nur en la franca, la aliaj estus iom post iom devigataj eklerni la francan por scii pri la lasta malkovraĵo. Sed intertempe ili ne ricevus Nobel-premiojn, kio estus teruraĵo!

Ertl: *Ni parolis pri la timo al la angla. Laŭ vi, kial oni timas Esperanton? Kaj ĉu necesas timi Esperanton?*

Eco: Mi ne opinias, ke ekzistas timo al Esperanto. Oni estas iamaniere ne interesata . . .

Ertl: . . . *prefere ne informata.*

Eco: Jes. Prenu min kiel ekzemplon: antaŭ ol mi ja devis okupiĝi pri tio, por esti serioza, mi tute prifajfis tion. Fakte. Tamen mi estas ekzemplo de klera homo kun granda scivolemo . . .

Ertl: *Kelkaj homoj opinias, ke lingvo nepre estu natura, kaj ke nur pro tio Esperanto neniam sukcesos venki.*

Eco: Pri tio ni jam diskutis: eĉ se, ĝis hieraŭ, aspektis neebla uzigi artefaritan lingvon, tute povas esti, ke morgaŭ la situacio estos malsama.

Koncerne min, antaŭ ol mi ekhavis pli klaran ideon pri Esperanto, ĝia artefariteco ja ĝenis min, sed post kiam mi ekstudis ĝin, mi preskaŭ kredis ĝin natura lingvo, tiel ke la artefariteco de Esperanto pezas sur ĝia historion, ĝia deveno, sed ne nepre sur ĝia gramatiko. Oni ĉiam opinias, ke artefarita lingvo estas malplia lingvo, lingvo kiel “**Me Tarzan, you Jane**”, kaj tio ne estas prava koncerne Esperanton.

NOTOJ

1. *La ricerca della lingua perfetta*. Bari: Laterza, 1993. *Die Suche nach der vollkommenen Sprache*. München: Beck, 1994. *La búsqueda de la lengua perfecta*. Barcelona: Crítica, 1994. *La recherche de la langue parfaite dans la culture européenne*. Paris: Seuil, 1994.

2. *La problemo de font-orientita kaj cel-orientita traduko*: la demando, ĉu traduko devas prioritare peri ĉiujn ecojn de la originalo (eĉ koste de sia propra valoro kiel teksto en la cellingvo), aŭ plie celi, ke ĝi mem estu plenvalora teksto en la cellingvo (eĉ koste de malfideleco al la originalo).

3. Taeschner, Traute: *The Sun is Feminine* ("La suno estas ina"). Berlin: Springer-Verlag, 1983. La vorto por *suno* estas in-genra en la germana (*die Sonne*) kaj vir-genra en multaj aliaj lingvoj, i.a. la itala.

4. Pri la eksperimento vd. Corsetti, Renato: "Serĉataj: dudek gravedaj esperantistinoj" (*Esperanto*, nov. 1992, p. 186) kaj Corsetti, Renato - Csöke Csilla: "Andrea diras 'ti-ta'". Disaj observoj pri la kreoliĝo de Esperanto" (*Esperanto*, apr. 1994, p. 62).

5. La irlanda aŭtoro Samuel Beckett (1906-1989) verkis kaj angle kaj france.

6. *Afekcio*: "la sento de agrableco aŭ malagrableco kiu akompanas iun sperton." (C.J. Adcock: *Fundamentoj de psikologio*. Liège: Someraj Universitataj Kursoj, 1976.)

7. "Kiel ĉiu lingvo, Esperanto evoluas, ĉar ĝi funkcias, kaj eĉ la reguloj formulitaj de la kreinto aŭ registritaj en lernolibro ne povus malhelpi tiun evoluadon." *Pri kelkaj problemoj de interlingvistiko: Intervjuo kun la franca lingvisto André Martinet* (François Lo Jacomo, Detlev Blanke). Rotterdam: UEA, 1993. Esperanto-dokumento 31E.

8. Tiun argumenton de Bernard de Fontenelle (1657-1757), franca verkisto kaj filozofo, eĥas d'Alembert en la enkonduka parolo al la *Enciklopedio* de Diderot.

9. Ĉirkaŭ la feria tago 15-a de aŭgusto (origine la festo de la ĉieliro de Maria) la aŭtomobila trafiko kaj la nombro de akcidentoj estas maksimumaj en Italio kaj en kelkaj aliaj landoj.

10. Hagège, Claude: *Le souffle de la langue. Voies et destins des parlers d'Europe* ("La spiro de la lingvo. Vojoj kaj destinoj de eŭropaj idiomoj"). Paris: Odile Jacob, 1992. Precipe p. 269-273.

11. Jan Amos Komenský aŭ Komenio (1592-1670), ĉeĥa filozofo, teologo, pedagogo kaj pioniro de la didaktika scienco.

12. *Chomsky-aj arboj*: la usona lingvisto Noam Chomsky (1928-) enkondukis novan aliron al sintaksa strukturo surbaze de arboformaj skemoj, taŭgaj por la naskiĝanta komputiko (*Syntactic Structures*, 1957).

13. *Metalingva* komunikado estas perlingva komunikado pri la lingvo mem.

14. Willard V. Quine (1908-), usona logikisto.

15. Aludo al eseo de Umberto Eco, *Travels in Hyperreality* ("Vojaĝoj en hiperreala"), pri la kulto por la falso en Usono.

16. Basil Bernstein (1924-), usona socilingvisto.

17. La 18-an de decembro 1992, okaze de unu el la menciitaj seminarioj de Umberto Eco en Collège de France, Alessandro Zinna lingvistike analizis Esperanton, helpe de teorioj de la dana lingvisto Louis Hjelmslev (1899-1965), i.a. pri la rilato inter esprimaj kaj esprimito (“Prolegomenoj al teorio pri lingvo”, 1943).

18. Temas pri la libroj: 1) Lamberti, Vitaliano: *Una voce per il mondo. Lejzer Zamenhof, il creatore dell’Esperanto* (“Voĉo por la mondo. Lejzer Zamenhof, la kreinto de Esperanto”). Milano: Mursia, 1991. 2) Migliorini, Elio: *Manuale di Esperanto*. Grosseto: CoEdEs, 1986.

19. Giuseppe Giacosa (1847-1906) kaj Edmondo de Amicis (1846-1908), italaj verkistoj, popularaj en sia epoko, el kies pluraj verkoj aperis Esperantaj tradukoj. Nun oni pli vaste legas nur la porinfanan *Koro* de Amicis (esperantlingve: 1936).

20. Pri la franca emo uzi pri ĉio la “ĝustan vorton” vd. Piron, Claude: *La bona lingvo*, Vieno-Budapeŝto: Pro Esperanto-HEA, 1989, p. 49-61.

21. *Piĝino*: “lingvo kiu ekestas kiam homoj el malsamaj lingvoj estas devigataj intertrakti” (Corsetti, Renato: “Andrea diras. . .”, vd. punkton 4), kaj speciale tiu mikslingvo kun angla bazo kiu disvastiĝis en Azio. *Kreolo*: piĝino kiu “iĝas normale uzata en iu komunumo kaj transdonata de generacio al generacio kiel gepatra lingvo” (Corsetti, samloke).

22. *Splashdown*: alakviĝo de revenanta astronauta veturilo.

23. Salvi, Sergio: *Le lingue tagliate*. Milano: Rizzoli, 1975, pri la lingvoj de italaj minoritatoj. La titolon, kiu povas signifi “eltonditaj *langoj*” aŭ “eltonditaj *lingvoj*”, ni eble povus mallerte redoni per “lingvoj por mutuloj”.

24. Laŭ la libro de Eco mem (vd. punkton 1), kiu referencas al la verko *Les langues véhiculaires* (“La interlingvoj”) de Louis-Jean Calvet (Paris: PUF, 1981): “dum la Konvencio [t.e. inter 1792 kaj 1795] la abato Grégoire rimarkigis ke dek kvin el la dudek ses milionoj da francoj parolas ankoraŭ lingvojn malsamajn de tiu de Parizo”.

25. Komisiono devanta proponi la novan terminologion por kroata aviado (cetere gvidata de esperantisto) sugestis la neologismon *zrakomlat* (“aerdrasililo”) anstataŭ la ĝistiamia *helikopter*, kio estigis viglan disputon.

26. La 5-an kaj 6-an de decembro 1992 Eco partoprenis la 5-an Internacian Kongreson de Hispana Asocio pri Semiotiko (vd. *Esperanto*, dec. 1992, p. 201).

27. La esprimon *lingvovoreco* uzas ekz. Andrea Chiti-Batelli en “Lingvo, potenco, hegemonio: Etnaj minoritatoj, internacia komunikado, eŭropa unueco”, *L’Esperanto*, 3-4/1992, p. 17.

28. *Frangla*: la pamfleto *Parlez-vous franglais?* (“Ĉu vi parolas la franglan?”) de René Etiemble en 1966 satire avertis kontraŭ leksika angligo de la franca lingvo.

29. *Logiciel* estas sukcesa francigo de la angla *software* (ambaŭ: softvaro).

30. Jacques Ruffié, franca biologo.

31. *Latino sine flexione* estas simpligita latino, kies planon la itala matematikisto Giuseppe Peano publikigis en 1903 en Torino.

32. Clauzade, G. kaj Roux, C.: *Likenoj de Okcidenta Eŭropo: Ilustrita determinlibro*. Royan: Société Botanique du Centre-Ouest, 1985. 893 p.

33. Laŭ Zamenhof: “Fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo.”

Listo de la Esperanto-Dokumentoj

N-ro	Titolo
1.	Unesko kaj UEA, 1954-1974 (elĉerpita)
2.	La kontribuo de Universala Esperanto-Asocio al la monda paco (elĉerpita)
3.	Esperanto tra la etero, 1922-1975 (elĉerpita)
4.	Enkonduko al Esperanto-studoj (elĉerpita)
5.	Universala Esperanto-Asocio en la Internacia Jaro de la Virino 1975 (elĉerpita)
6.	Internacia turismo de la parolantoj de Esperanto (elĉerpita)
7.	Lingvaj problemoj kaj la Fina Akto (elĉerpita)
8.	La lingva problemo en la Eŭropa Komunumaro (elĉerpita)
9.	Esperanto kaj la pliaĝuloj (elĉerpita)
10.	Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo? (elĉerpita)
11.	La lingvo kaj la rajto je komunikado (elĉerpita)
12.	La uzado de la internacia lingvo Esperanto kiel parta solvo de la lingvoproblemoj en internaciaj neregistaraj organizoj: kelkaj rekomendoj (elĉerpita)
13.	La lingva problemo de la movado de nealiancitaj landoj
14.	Rezolucioj de la 65a Universala Kongreso de Esperanto
15.	Ses esplorcentroj pri interlingvoj
16.	La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo
17.	Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado. Raporto pri la 67a Universala Kongreso de Esperanto, 1982.
18.	Lingvaj malhelpoj en rilato al la nova monda informa kaj komunika ordo
19.	Monda Komunika Jaro: Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado
20.	La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo (2a eld.)
21.	Historio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
22.	La lingva problemo en turismo
23.	La soci-politika, pedagogia kaj kultura valoroj de Esperanto
24.	La lingva problemo en scienco kaj la rolo de la internacia lingvo
25.	Esperanto – lingvo de la natursciencoj kaj tekniko
26.	Psikologiaj reagoj al Esperanto
27.	Al unu lingvo por Eŭropo? La estonteco de la eŭropa Babelo
28-29.	Al nova internacia lingvopolitiko: La propedeŭtika valoro de Esperanto
30.	Perkomputila tradukado: La revo kaj la realo
31.	Pri kelkaj problemoj de interlingvistiko: Intervjuo kun la franca lingvisto André Martinet

Pluraj el la ĉi-supre menciitaj broŝuroj haveblas ankaŭ en la franca kaj angla lingvoj.

FONDOŜTONOJ POR LA DUA JARCENTO

En la Jubilea Kolekto de UEA aperis:

Esperanta antologio

Trezorminejo el pli ol 700 poemoj de 163 aŭtoroj.
Redaktis William Auld. 888p. 60,00 gld.

Plena analiza gramatiko

Profunda studo pri la internaj reguloj de Esperanto.
Kálmán Kalocsay, Gaston Waringhien. 598p. 48,00 gld.

Lingvo kaj vivo

Eleganta esearo pri la naskiĝo kaj evoluo de Esperanto.
Gaston Waringhien. 452p. 48,00 gld.

Trezoro: La Esperanta novelarto

Riĉa sortimento de pli ol 150 prozaĵoj de 100 aŭtoroj.
Redaktis Reto Rossetti, Henri Vatré. Eldonis HEA. 948p.
69,00 gld.

Nova Esperanta krestomatio

Teme kaj lingve moderna trarigardo de nia lingvotradicio,
redaktita de William Auld. 510p. 57,00 gld.

Fundamenta krestomatio

La klasika stilmodelo redaktita de Zamenhof, kun novaj
lingvaj notoj de Gaston Waringhien. 464p. 48,00 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!